Provizora programo: La kongresanoj estos atendataj aŭ en la limstacioj aŭ en la rendevulokoj Innsbruck, Salzburg, Linz kaj Graz. En ĉiuj ili estos salutataj oficiale de l' land- kaj urbestroj; poste komuna veturado de Innsbruck, Salzburg kaj Linz per aparta(j) ŝipo(j) al Wien; la Graz-anoj kondukos la gastojn rekte al Wien. Alveno la 29. julio vespere je la 18 h. Konatiĝvespero. 30. VII. Akcepto ĉe la plej altrangaj oficialuloj kaj „Malfermo de Int. Esperanto-Muzeo"; ptgm. ekskurso al Schönbrunn per tramo aŭ vizito de bordbanejo; vesp. amuzo en Prater. 31. VII. gvidado tra malnova kaj moderna Wien v. koncerto en Stadtpark. 1. VIII. matene komuna veturado per aparta(j) ŝipo(j) al la kongreso en Budapest, kie ni alvenos ĝustatempe por konatiĝa vespero.

Kion ricevos la kongresanoj por la malalta kotizo? Kongreskarton, kiu **sole rajtigos** por granda rabato (25—50%) sur fervojo kaj ŝipo por la veturado al Wien kaj poste al Budapest kaj post la XXI-a por vojaĝi de Wien rekte al iu limo aŭ por vojaĝi en Aŭstrio mem, kaj por **verŝajne senpaga vizo** (tion ni ne ankoraŭ pritraktis, sed ni esperas, ke ni ricevos ĝin); **kongresinsignon**; **gvidlibro tra Wien** (eldonota); **la oficialan organon** „Aŭstria Esperantisto" dum la **unua duonjaro 1929** kun la sciigoj pri la kongresaranĝoj kaj la muzeaferoj; **membrecon al „Int. Esp.-Muzeo, Wien" por 1929** kun membrokarto; ili krom tio ĝuos **ekskurson al Schönbrunn** kaj **tuttagan gvidadon tra la urbo**.

La ricevitaj okjektoj kaj avantaĝoj per si mem jam valoros la malaltan kongreskotizon, sed la rabato sur fervojo kaj ŝipo **sole** jam ŝparos al vi la kotizon. Verŝajna senpaga vizo ankoraŭ pligrandigos viajn avantaĝojn.

Por membroj de „Int. E.-Muzeo" la kotizo malpliaitiĝas je ŝ. 1.— kaj por abonantoj de Aŭstria Esperantisto aparte je ŝ. 2.—.

Aliĝoj: Ni petas aliĝu plejeble tuj, por ke ni sciu kun kiom da gastoj ni devas kalkuli.

La vivkostoj estas malaltaj: Komunaj tag- kaj vespermanĝoj je la prezo de ŝ. 1.50—2.—; matenmanĝo kompleta ŝ. 1.—; loĝado jam de ŝ. 4.— aranĝotaj.

Pri Wien mem malnecesas skribi himnon! Ĝi estas konata kaj ŝatata en la tuta mondo!

Ordono de la Hungara poŝto.

La hungara poŝtdirekcio per ordono n-ro 9857/1928 X. 4. akceptis s-ron poŝtan ĉefinspektoron Stef. Zöldy kiel delegiton de ILEPTO en Hungarujo, oficiale decidis interrilati kun ILEPTO-Paris kaj ties E.-revuo, kaj sendis cirkuleron al ĉiuj Budapestaj poŝtoficejoj, ke oni oficiale kunskribu tiujn, kiuj deziras lerni E.-on. El tiuj la direkcio oficiale sendos elektitojn al kurso de la prepara komitato por la 21. Univ. Kong. en Budapest.

S-ro Niŝimura, la redaktoro de „Oomoto" en Paris, paroladis pri E.-movado en Eŭropo antaŭ 150 pers. en Tokio la 26. de majo. Li nun revenos Eŭropon. „E. en Nipponlando."

Unua E.-kurso ĉe la ĝendarmaro.



Sidantaj: (de maldekstre) s-roj Eisner, Burger, ĉefinsp. Steiner (kursgvid.), ĉefinsp. Jesser, Siml; starantaj: Hermann, Millauer, Brantner, Rasch, Ertl, Fessl.

El mia vivo.

(Rememoroj kaj travivaĵoj de malnova kaj — ho, ve! — maljuna esperantisto.)

J. Ŝirjaev-Balklanka, USSR.

„Esperanto“! Kiel dolĉe, mistere sonas tiu ĉi sorĉa vorto ĝis nun por mi — malnovulo, kiu uzis ĝin seninterrompe de la juneco mem dum pli granda parto de la vivo.

Sen troigo mi povas diri, ke nenio krom ĝi dum la tuta vivo efikis je mi tiel bone, nenio restigis post si pli belajn rememorojn; ke Esperanto kaj mia vivo estas tre intime, nedisigeble kunligitaj unu kun la alia; ke unu estas neebla, neimagebla sen la alia en mia koncepto; ke Esperanto estas kvazaŭ ereto de mi mem. Memafere, Esperanto plilarĝigis mian intelektan horizonton, konservis min ĝis la maljuneco eĉ juna kaj vigla spirite, helpis al mi eviti multajn pereigajn delogojn kaj erarojn dum la juneco, kreskigis en mi amon al homoj, kiel al fratoj. Esperanto donacis al mi multajn amikojn kaj sennombrajn feliĉajn horojn, ĝenerale ĝi plibeligis tutan mian vivon. Multe da ventegoj turnovente trakuris super mia kapo, sed mi restis sendifekta, mi tion scias, nur dank' al Esperanto, al mia ĉiama okupado je ĝi.

Kaj nun, kiam senrevene pasis la plej bona parto de la vivo, kiam en vivbatalo mi jam perdis preskaŭ ĉiujn miajn fortojn kaj ĉiam pli ofte minacas al mi malrapide-ŝteliranta maljunula kadukeco kun ĝiaj neeviteblaj akompanantoj, mi sen bedaŭro, sen sopiro rigardas la pasintaĵon. Nek timigas min morto, nek turmentas min konsciencriproĉoj, — mi mortos, mi estas tute certa pri tio, kun feliĉa konscio, ke la vivo pasis ne senfrukte por mi, ke mi ankaŭ „ion“ faris dum ĝi. Arego de plej karaj rememoroj, de ĉarmaj neforgeseblaj, kortuŝaj epizodoj kaj scenoj de la kun-esperanta pasintaĵo,

mi scias, ĉirkaŭventumos mian estingiĝantan estaĵon kaj dolĉigos por mi transiron en la eternecon ...

Estante ankoraŭ junulo, mi tute okaze eksciis je unua fojo (en 1895) pri ekzisto de Esperanto — la lingvo internacia. Estis somero, mi ĵus revenis el la urbo, kie mi lernis, en la kamparon al la gepatroj. Sed promenoj en la admirinda ĉirkaŭaĵo, konataj de la infaneco, laboroj en la ĝardeno, pri kiuj mi revis en la urbo, kiuj tiel min logis hejmen, baldaŭ tedis al mi, mi eksentis bezonon je alispeca, pli kutima tempopasigado. La patro, kiel ankaŭ niaj samvilaĝanoj, ne havis multajn librojn, sed li abonis bonegan, tiutempe faman semajnan gazeton „Njedjélia" („Semajno"). Mi kolektis ĉiujn numerojn de ĝi, aperintajn dum mia foresto, kaj profundiĝis en legadon.

En unu malproksima angulo de la ĝardeno kreskis dikega maljuna tilio, la benko sub ĝiaj branĉoj estis plej amata mia sidloko. Tien penetris neniam varmego de la suno kaj nur tre malofte venis iu el niaj familianoj. Tie mi ŝatis dum vesperoj revi per junule-arda imago; tie, malproksime de homoj, mi ŝatis iafoje elverŝi al la tilio miajn ĉagrenojn kaj disreviĝojn; tie mi ankaŭ legis, ĉiam atakata de nekalkuleblaj sangaviduloj-kuloj.

Kaj unufoje mia atento estis altirita de granda artikolo en la gazeto, titolita: „La svedoj en Rusujo". Ĝia aŭtoro en nekutime-alloga formo kaj kun purejunula entuziasmo priskribis siajn impresojn de kelktaga kunestado en societo de tri junaj svedaj studentoj de Upsala universitato, vojaĝintaj tra Eŭropo. Li rakontis, ke, veninte Odesaon kaj trovinte tie „samideanojn", ili gastis tie pli longe ol supozite; ke la tempo pasigita en ilia rondo restos por ĉiam neforgesebla por li; ke ili bonege komprenis unu la alian malgraŭ tio, ke li tute ne konis la svedan lingvon kaj ili — la rusan, sed ĉiuj interparoloj pri kia ajn temo estis farataj sole en Esperanto.

La artikolo tiel profunde influis je mi, la enigmoplena, sorĉa Esperanto tiel ekinteresis min, ke mi tuj decidis, sekvante konvinkigan konsilon de la aŭtoro, bonuzi la liberan tempon por senprokraste konatiĝi kun la lingvo. Sub la tilio mi faris la unuan paŝon al tiu agado, kiu poste kaptis min por tuta mia vivo!

Mi montris la artikolon al mia frato plej maljuna, kiu estis lernejestro en la vilaĝo, kiun oni opiniis homo tre instruita kaj kies konsilojn oni petis en diversaj okazoj de vivo. La frato nur mokridis je la artikolo kaj je mi kaj konsilis anstataŭ la artefarita lingvo, „kiun neniu konas", pli diligente lerni la germanan, kiu estas disvastigita tra la tuta mondo kaj havas riĉegan literaturon.

La frato disrevigis min, sed ne sukcesis estingi en mi la scivolon kaj forigi la impreson de la artikolo. Dum la sama tago mi skribis, al neniu dirinte tion, leteron al la aŭtoro de la lingvo, aldonis 7-kopekan poŝtmarkon (la prezon de la lernolibro kun afranko!) kaj petis sendi al mi la lernolibron.

La tilio neniam vidis min tiom emocioplenan, kontentan, kia mi estis sub ĝiaj branĉoj post kelkaj tagoj kun ĵus ricevita eta broŝureto en la manoj, titolita „D-ro Esperanto. Lingvo internacia". Mi legis kaj relegis ĝin kun entuziasmo nekutima, mirante je la simpleco de la gramatiko, ĉiam trovante en ĝi novajn allogaĵojn, ĉiam sentante nevenkeblan emon fariĝi kiel eble plej baldaŭ adepto de la alloga ideo de frateco de popoloj, ano de „unu granda familio".

Mi ree konfidis mian intencon al la parencoj, ili aŭskultis min silente, poste kelkaj el ili longe-longe mokis je mi. Sed la mokado ne havis deziratan efikon, kontraŭe, ĝi, metinte neelstrekeblan signon sur mian ankoraŭ nemalmoliĝintan karakteron, pligrandigis mian ardon al la ideo kaj instruis min, esti pli singardema, pli kaŝema. De tiam ĉiun mian pluan ĝojon kaj malĝojon, entuziasmon kaj revon mi iom

post iom alkutimiĝis konfidi nur al la tilio, kiu fidele konservis ĉiujn sekretojn kaj ofte en minutoj de hezitado aprobis, kuraĝigis min per dolĉa mallaŭta bruetado de sia denso bonodora foliaro. (Daŭrigota.)

Epizodo.

Skizo de Alexander Taussig.

Antaŭ kelkaj semajnoj mi ekskursis en parton de la ofte prikantita „Wienerwald“ (Wien-a Arbaro).

Estis belega dimanĉaposttagmezo kaj mi preterlasas la frazojn pri „birdkantado, ludetantaj sunradioj“ k. t. p. Nur epizodon mi volas mencii, kies atestanto mi estis okaze de mia reveturado.

Estis proksimume la naŭa vespere, kiam la tramo, per kiu mi veturis, atingis la tombejon ĉe Döbling.

Tie, antaŭ la tombeja pordeto mi rimarkis aron de tiel nomataj „Wandervögel“, (ekskursuloj) junularo kun mandolinoj en la manoj, kiu kantis melankolian melodion direktitan al la tombejo. Malĝoja la kanto penetris en la stelplenan nokton; iom post iom la kanto mallaŭtiĝis ĝis fine ĝi mutiĝis, forŝvebante en la siringsaturitan, dieçan naturon.

Ĉar la tramo formoviĝis, mi aŭdis ankoraŭ nur la komandon: „Antaŭen“ kaj rigardante reen mi rimarkis, ke la gejunuloj, ĵus kantintaj malgajan melodion, ekmarŝis kaj petola, gaja marŝkanto penetris al mia orelo.

Malkaŝe mi konfesas, ke tiu ĉi epizodo, kiun mi ĝisvivis ĵus, tiel min kortuŝis, ke larmoj plenigis miajn okulojn.

Kion signifis tiu ĉi sceno?

Ĉu la junularo salutis mortintan kamaradon, amikon aŭ amikinon? Ĉu ilia saluto estis sendita al la patro aŭ patrino, tie dormantaj la eternan dormon? Ĉu ĝi estis nura, spontanea manifestacio de la ŝaŭmanta vivo antaŭ la majesteco de la morto ĉion venkanta? Klarigon pri tio mi ne povis doni al mi, sed konfesas nur jenon: mi ne hontis miajn larmojn, gutantajn el miaj okuloj kaj staris emociite sur mia loko en la tramo.

Subite sinjoro apud mi staranta, kiu verŝajne ĵus venis de iu elverŝejo de nova vino (tiel nomata „Heuriger“) sin ekaŭdigis jene:

„Estas terure! Tiu ĉi nuntempa junularo ne konas respekton, eĉ antaŭ la tombejo ili kuraĝas kantaĉi!“ Senvole mi devis rideti.

Jen idealismo kaj realismo unu apud la alia! — — —

Studvojaĝo de tramvojisto.

Fr. Joh. Karlsson, tramvojisto el Stockholm, faris kun stipendio de Stockholm-a Tramvoj-Asocio studvojaĝon al Berlin, Dresden, Praha kaj Wien. Alveninte la 19. de junio en Wien s-anoj Frey kaj Sperling kondukis lin al la direkcio de „Strassenbahnen“, kie inĝ. Traxel pro foresto de direktoro Spängler afable akceptis ilin. Li tuj disponigis s-anon Vesely kiel interpretiston por du tagoj. Inĝ. Valentin, ĉefo de la remizoj, donis statistikajn datojn, planojn, gvidilojn kaj aŭtomobile kondukis Karlsson al remizo Favoriten, kies estro inĝ. Klimt donis informojn. Post rondveturado per subtera elektra fervojo li vizitis vagonfabrikon, domojn de tramvojistoj kaj ilian bordbanejon.

El propaganda vidpunkto grave estas, ke Karlsson nur povis entrepreni la vojaĝon, ĉar li scipovas E.-on krom la sveda lingvo.

Bonege la instalaĵoj, la urbo ktp., eble ankaŭ la inoj, plaĉis al nia gasto tiele, ke li promesis inviti la s-anojn en Stockholm viziti „Antaŭkongreson“ en Wien. Sperling.

Plena vortaro de Esperanto.

„Sennaciulo“ anoncas en sia n-ro 185, ke SAT prenis sur sin la eldonon de Plena Vortaro de Esp. Ĝi estas nun verkata de kolektivo el kvar kompetentuloj, L. K.-anoj, kaj estos trioble pli ampleksa ol tiu de Kabe. La verkaĵo estos ideologie kontrolata de la direkcio de SAT.

La prezo ne ankoraŭ estas kalkulata, sed estos relative malalta kaj sekve la vortaro povos esti aĉetata de ĉiu laboristo.

Pro informoj skribu al Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27.

D-ro Sós — UEA-komitatano.

D-ro Sós dum multaj jaroj estis del., poste ĉefdel. de UEA en Wien. Nun li estas elektita komitatano de UEA., la unua el Aŭstrio. Ni gratulas al nia malnova laborema samideano.

Proletariaro kaj Esperanto.

En Japanujo ĵus aperis gazeto „Int. Proleta Korespondo (Inprokor)". Red. T. Ootaguro; eld. Isukura-Kaku, Gembel 72, Tozuka, Tokio.

„E. en Nipponl."

Deficito el XVI a.

Bilanco.

Deficito (15 a sept. 1927)		13.207·58
Donacoj	530.47	
Rezigno de kreditoro	200·—	
Spezoj		211·88
Deficito (30 a junio 1928)	12.688·99	
	13.419·46	13.419·46
Deficito (15 a sept. 1927)	13.207·58	
„ (30 a junio 1828)	12.688·99	
Malaltiĝo	518·59	

Detaloj de la nuna deficito:

postulo Hollinek	5.050·—
„ Manyas	40·—
„ Hartwich	200·—
„ Schade	2.757·35
„ Schamanek	50·—
„ Schicketanz	140·—
„ Schröder	400·—
„ Smital	330·—
„ Sós	700·—
„ Zimmermann	2.221·64
„ Zwach	800·—
	12.688·99

Kontr. A. Klein.

AŬSTRIA ESPERANTO-DELEGITARO

Bisamberg bei Wien 248.

Al la grupoj kaj izoluloj!

Novaj statutoj nun estas ellaborataj kaj estos pridecidataj en aŭtuno.

Bonvolu jam nun helpi nin!

Sendu duoblan liston de viaj funkciuloj, aliaj membroj kaj de nemembroj loĝantaj en via loko kaj distrikto kun preciza adreso.

Raportu (kun du kopioj) ĉiun okazintaĵon, ĉar ni publikigos ĝin en AE., Esperanto kaj Heroldo. Vi ŝparos per tio monon.

Instigu viajn lokajn gazetojn je enpreso de artikoletoj. Tekston liveras AE. (1. pĝ.) Sendu al ni la eltranĉojn.

Fondu grupon, se nur estas 5 en unu loko. Statutojn ni sendos al vi.

Zorgu jam nun por kursoj en aŭtuno.

Nia prezidanto intencas paroli kun lumbildoj en aŭtuno pri la XX. en jenaj lokoj, kie oni deziras tion. Kiu tion volas, skribu tuj al ni. La kostoj estos malaltaj.

Nunaj landestroj: Kärnten-prof. d-ro Hohenwarter, Klagenfurt (Marianeum); N.-Österr.-lern.-kons. Peter, Bisamberg; O.-Österr.-polic.-insp. Meisleder, Linz, Graben 26; Salzburg-prof. d-ro Christanell, Parsch; Steiermark-kolonelo Hackl, Graz, Radetzkystr. 6; Tirol-fakinstr. Mair, Innsbruck, Grenzstr. 4. Por Burgenland kaj Vorarlberg ankoraŭ mankas landestroj.

Ĉiujn demandojn bonvolu **aldoni respondafrankon!**

Estrarkunsidoj okazis 3. kaj 6. julio.

Por AED: Steiner, prez., Weber, ĝen. sekr.

Graz: E.-Soc. p. Stirio: La estraro decidis starigi kongreskason, por plifaciligi al la membroj la partoprenon en la XXI. venontjare. Pago da 12—15 Ŝ. pomonate verŝajne sufiĉos. Kiu ne veturos, ricevos la enpagitan monon de l' kasisto H. Conti, Graz, Lagerg. 44. — Sabate, la 4. aŭg. ni aranĝos amuzan vesperon en gastejo Godinger, St. Peter b. Graz. Komenco, je la 20 h. Venu gastoj! — Dum aŭg. estos ekskurso al Stainz. Informojn dum ĉiuj ĵaŭdaj kunvenoj en „Pastete".

Innsbruck: En solena kunveno, la 27. de junio, prez. Mair transdonis la honormembrajn diplomojn al la malnovaj, meritplenaj s-anoj Hans Bederlunger malj., prof. Fr. Egger kaj Josef Bauer. (Ni gratulas!)

Linz: Bela fotografaĵo montras f-inon Cipera inter sia E.-lernejanaro. Gratulon!

Sigmundsherberg: La 15. junio d-ro Scheuer finis sian kurson, la unuan en S. Granda nombro venis por danki al d-ro Scheuer pro liaj klopodoj senlacaj. Grupo estas fondita. Raporto sekvos. Adr.: Rudolf Frittum, Sigmundsherberg 73.

Zwettl: S-anoj el Sigmundsherberg vizitis la 8. de julio la kursanaron en Zwettl. Al ni sendita fotografaĵo montras en la mezo P. Schmalbaŭg kaj s-ron Kotremba, krome Berndl, Frittum, f-inon Lux. Bedaŭrinde ni ne povas represi la fotografaĵon, ĉar la kliŝo kostas tro multe.

Ni gratulas al **s-ro Friedrich A. M. Stengel,** sekr. de Teknik-akademia E.-Klubo-Wien, kiu post bonega ŝtata ekzameno fariĝis inĝeniero kaj samtempe ankaŭ asistanto en Teknika Altlernejo-Wien.

Por niaj fratoj en Bulgarujo!

Ĉis nun kolektite laŭ AE 6 . . .	Ŝ 37·10
E.-grupo Leoben	„ 5·—
Daŭrigota. AED. sume . .	Ŝ 42·10

Rimarkindaj Presaĵoj.

Juĝo de verkinto.

„.... Tre malofte oni povas renkonti en recenzoj tian lojalecon, tian sincerecon kaj honestan objektivecon, kiun mi vidis en la recenzo pri mia verko."

Sennaciece Izgur

Paul Knepler (Wallishaussersche Buchhdg.):

Poeziaĵoj de F. Schiller, trad. de kolonelo Zwach. Dua eldono. Prezo S 1·20.

Pasis nur kelkaj semajnoj depost ni entombigis lin, „la kolonelon", nian poeton; ankoraŭ kunvivas nia sentado la kortuŝan adiaŭon ĉe lia tombo kaj multaj el ni eĉ ne povos reteni larmojn falantajn sur la libreton, kiu kvazaŭ lia unua spirita saluto de transe venas en nian manon. En „Antaŭparolo al dua eldono" li mem parolas al ni; — lastajn vortojn, skribitajn nur kelkajn tagojn antaŭ lia morto. Bedaŭrinde li ne ĝisvivis la eliron de ĉi tiu libro, per kiu nun laŭ la vortoj de la eldoninto estu honorata lia genio!

Legante la poeziaĵojn en unua formo oni jam klare eksentis de la unua ĝis la lasta verso la altgradan poezian inspiron, sub kies kvazaŭ deviga influo la tradukinto-poeto estis kreinta la verkon.

Komparante la duan eldonon oni devas nun admiri la lingvan lertecon de la poeto-tradukinto. Mem plenmatura eminentulo li donis per delikata „fajlilo" al sia verko plej atingeblan maturecon. Por tiuj, kiuj posedas ekzempleron de la unua eldono, estiĝos granda plezuro en la komparado de ambaŭ pro la interesaj ŝanĝoj, troviĝantaj en la dua eldono. Precipe ni germanlingvaj esperantistoj ekkonas la altvaloron de la transverkaĵoj. Kiel fidele laŭ ritmo kaj preskaŭ oni povus diri „laŭvorte" ili rebrilas la tutan esencon de la originalo en agrabla simpleco de la parolo.

Kaj esperantistoj fremdlandaj, kiuj entute ne aŭ nur per nacilingvaj tradukoj konas Schiller-poemojn, povas per tiu perfekta E.-traduko konantiĝi kaj plensence ĝui la plej famkonatajn poeziaĵojn de Schiller.

En la dua eldono estas la poemo „La divido de la tero" anstataŭigita per „Pegasus en jugo". Sur lasta paĝo ni trovas ĉarman poeziaĵon „Laŭ Dia vol'", origine esperantlingva poemo de nia kara, mortinta poeto Zwach.

La eldoninto, nia estimata samideano d-ro Sós, kiu per siaj klopodoj realigis la duan eldonon de la libro, meritas nian sinceran dankon.

La malalta prezo ebligas al ĉiu esperantisto, posedi tiun ĉi juvelaron.

Christine Siedl.

Espero Katolika-Paris:

Parvuli. Rakonto de Alb. Bessieres, S. J. el franca lingvo trad. de Ramo.

La broŝuro entenante la kortuŝantan rakonton pri la sepjara knabo Peĉjo de Erel, estas konsolplena legaĵo por kredemuloj, por aliaj vojo por pliboniĝi. La aŭtoro montras, kia animforto ofte troviĝas en la koroj de la „Etuloj". Peĉjo ne nur estas modelo por la gefratoj, sed li konvertigas ankaŭ la patrinon, fondis ligon de komuniiĝantoj kaj fine prenas sur sin egan suferon, eĉ la akran morton, por konverti la patron, kiu estis kapitano kaj tute nekredema.

La traduko estas facile legebla, sed sur paĝo 7a mankas vorto aŭ linio.

D-rino Flasch.

Heroldo de Esperanto-Horrem:

La morto de Danton. Tragedio, de Aleksej N. Tolstoj. El la rusa lingvo tradukis Nikolao Hohlov. Post bankrotigo de la ĝirondanoj, la modera partio de la respublikanoj, volis la jakobenoj konservi la sukcesojn de la revolucio per ekstermo de ĉiuj malamikoj de la respubliko. En ĉi tiu epoko de la franca revolucio, konata sub la nomo „teroro" (1793—1794) estis post mortigo de Marat la plej prominentaj viroj Danton kaj Robespierre, kiuj per teruraj kruelaĵoj kvazaŭ dronigis la ĉefurbon en sangon. Poste la du viroj malinterkonsentiĝis. Robespierre deziris akiri la absolutan potencon, diktatorecon, konspiris kontraŭ Danton kaj liaj amikoj, ĝis fine la revolucia tribunalo ilin kondamnis al morto kaj ekzekutis per gilotino. Ĉi tiu epizodo el la franca revolucio estas en la dramo en dekdu bildoj kun verva poezia arto prezentata. Ni ne dubas, ke ĉi tiu dramo, ludata sur teatra scenejo, devas havi grandan efikon. Sed ankaŭ ĝin legante ĝi faras frapantan impreson. La esperanta traduko estas bonega kaj same poezia. Ĝi povas esti envicigita inter la plej perfektaj verkoj de nia literaturo.

Dr-o Sós.

Eldona kooperativo de SAT-Leipzig.

Nur volu. La festo de la laboro kaj paco. Unuamaja kanto de ribelo. De E. Izgur. Eldono dua. 1927. 48 paĝa broŝuro. Kun portreto de l'aŭtoro kaj multaj ilustraĵoj.

„Tiu, kiu rigardas per malfermaj okuloj la eŭropan politikon, devas vidi kiel prepariĝas nova milito.

Tiu, kiu observas per malfermaj okuloj la progresojn de la tehniko, scias, ke nova milito estas la plej granda malfeliĉo, kiu povas trafi la ĝtn partoprenantajn naciojn.

La duobla evoluo de la tehniko: de la komunikadtehniko, celanta la unuiĝon de la homaro al unu sola organizo, kaj de la milittehniko, per kiu milito fariĝos el sangellaso sinmortigo, akcelas la alvenon de tago, je kiu la epokon de militoj anstataŭos epoko de laboro."

Ĉi tiuj vortoj de la fama pioniro de Paneŭropo kaj entuziasma pacifisto Coudenhove-Kalergi estas laŭsence konformaj al tiuj, kiujn Izgur en sia verve verkita broŝuro direktas al la tutmonda proletariaro.

„Geproletoj, gelaboristoj, gekamparanoj, invalidoj de l' tutmonda milito, trompitaj soldatoj kaj maristoj, proleta junularo, studentaro, honesta inteligentularo, sklavigitaj kaj aĉigitaj popoloj de la tero, ektremigu la teron per via unuanima voĉo kaj volo:

For la militon."

„Nur volu" estas per flamaj vortoj skribita revolucia, ribeliga sed ankaŭ pacifista verko. „Neniam ankoraŭ la muzo de l' poeto leviĝis sur tian kapturnigan altecon, neniam ankoraŭ la poezio de proletario atingis tian simplecon kaj profundecon de l' inspiro, kiel en ĉi tiu vere granda himno . . ." diras en antaŭparolo por la ruslingva eldono M. Panebratcev, kaj karakterizas per tio la verkon tiel ĝuste, ke ni ne povas ion plu aldoni.

Post apero de mia recenzo pri la libro „Je Nomo de l' vivo" (A. E. 1928. No. 1) mi ricevis de Izgur leteron, en kiu li i. a. skribas: „Mi sentas devon diri al vi, ke mi ne estas partiano. Mi estas ekster ia partio; mi estas proleto, eksbakisto, nun verkisto, forlasinta la verkadon en naciaj lingvoj, post kiam mi ekposedis Esperanton. La reston de mia vivo mi decidis fordoni al propagando de Esperanto inter la proletaj medioj kaj al verkado en ĉi tiu lingvo."

Vere la tutmonda laboristaro povas esti fiera kaj feliĉa, havante tian vervan poeton kaj fervoran pioniron.

Sed ankaŭ la „neŭtrala" samideanaro devas legi ĉi tiun libreton. Ĝi enhavas multe da gravaj pensoj, kiuj valoras esti serioze konsiderataj. D-ro Sós

Aliaj:

„Esperanto, 500 komercaj frazoj" de Rob. Kreuz, L. K. Eld. Wilh. Violet, Stuttgart.

Robert Kreuz, longtempe laborinta en komerca metio, verkis laŭ siaj longjaraj bonaj spertoj ĉi tiujn 500 frazojn komercajn, formitaj por specialaj aferokazantaĵoj kaj kun malgrandaj ŝanĝoj preskaŭ ĉiam taŭgaj. De ĉi tiu eldono ekzistas paralel-eldonoj en la lingvoj angla, franca, germana kaj hispana kun samsenca enhavo. Ili povas servi, ĉar la libro enhavas nur E.-tekson, kiel helpilo por ne sufiĉe spertaj esp.-istoj. kaj estas uzebla tiel por grupa studado kiel por hejma lernado.

Ni ege rekomendas la libron. La prezo ankaŭ estas tiel malalta, nur 1 sv. fr. St.

„Fajreroj", unua poemaro de Adalbert Smit, eld. Holanda E.-Oficejo, 1927. 63 paĝa, Prezo Sm. —.50.

Fluaj kaj facile kompreneblaj versoj, ĉefparte originalaj, kiuj prikantas Dion, amon, kuraĝon, laboron . . . Inter la originalaĵoj tre plaĉis al mi poemo al Zamenhof „Batalkanto".

Certe la 63 paĝa libro trovos la vojon en la bibliotekojn.

Do Smit ne nur estas konata propagandisto sed ankaŭ bona poeto. F. Stengel.

Rekomendindaj firmoj.

Bäckerei = bakejo: **Korneuburg.**
Karl Luegmayer (E), Albrechtstraße 3.
Gemischtwaren = Diversaĵoj:
Alois Cisař, Bisambergstr. 21.

Kaltenleutgeben.
Peter Pich, komercisto (E), Hauptstrasse 61.

Kie oni renkontas E.-istojn?

Graz.

Esp. Verein für Steiermark, Geschäftsstelle (oficejo) Radetzkystr. 6/III, Vereinsheim (kunv.) „Pastete", Sporg. 28, Do (j)20—23 h.

Leoben.

E.-Verein f. Steiermark: Cafe Weidbacher, Mi (me) 20—22 h.

Innsbruck.

Arbeiter-Esp.-Klub (Laborista klubo), Südtiroler Platz, Hotel Sonne, Do (j) 20—22 h.

Esperanto - Klub, Gasthof „Grüner Baum", Museumstraße. Mi (me) 20—22 h.

Wien.

Katolika Unuiĝo Esperantista en Wien, I., Freyung 6 (Pfarrkanzlei), Mi (me) 17—19 h.

I. Wiener Esp.-Verein, I., Schellinggasse 12, Kafejo Hofbauer, Di. (m) 19·30 h.
Aŭstria Pacifista Esp.-Societo, III., Henslergasse 3, Hochparterre; Fr (v), 19—21 h.
Esp.-Verein der städt. Angestellten Wiens, IV., Schäffergasse 8, ĉiutage 17 - 19 h.
„Konkordo", IV., Margaretenstr. 33 (Kaffee Aŭstria) Do (j) 20 h.
Viena Akademia Unuiĝo Esp., VII., Neubaugasse 25, Café Elsahof, Mo (l) 19—22 h.
Esp.-societo „Danubio", VII., Neubaugasse 25, Café Elsahof, Mo (l) 19—23 h.
Esp.-Bildungsverein „Supren", VII., Kaiserstraße 121, Café, Fr (v) 18—21 h.
Esp.-societo „Fideleco", Währinger Bürgercafé, XVIII., Staudg. 1, Di (m) 16—19 h.
Bohema Klubo Esperantista, XV., Turnerg. 9, I. et., Narodni dum, Mi (me) 20 h.

Posedanto, administranto, eldonanto kaj respondeca redaktoro Hugo Steiner, Bisamberg 248.
Presejo: Gesellschafts-Buchdruckerei Brüder Hollinek, Wien III, Steingasse 25.